


# La Espero




SWEDISH ESPERANTO NEWS

Nro 2/1988

75-jara







*Nu är den här:*  
**Jen nia  
mondo 2**

Pris 54 kr

Förlagsföreningen  
Esperanto  
Box 1502  
200 42 MALMÖ  
Pg 578 - 5

**Förlags-  
föreningen  
Esperanto  
upa**

håller årsstämma  
under kongressen i  
Sundsvall, lördagen  
den 21 maj 1988  
kl. 9.00.

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet  
Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm,  
tel. 08-11 74 34  
Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg  
Redaktör: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga,  
tel. 0589-155 31  
Sättning: Per Aarne Fritzon  
Utformning: Franko Luin, Tyresö  
Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1988

## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm,  
tel. 08-11 74 34  
Öppettider: måndag - fredag kl. 10.00 - 14.00; måndag - torsdag även  
17.30 - 19; vissa lördagar kl. 10.00 - 12.00.  
Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet  
Medlemsavgift:  
Direktansluten medlem 100 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr.  
Ungdomsmedlem 50 kr.  
Enbart prenumeration: 100 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 50 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.  
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den,  
meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

## SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga,  
tel. 0589-155 31 (*La Espero*, massmedier)  
Vice ordförande: Märtha Andréasson, Pl. 2265, 425 00 Hisings Kärra,  
tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)  
Sekreterare: Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,  
tel. 08-712 82 91 (kansliet)  
Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,  
tel. 0500-122 05 (massmedier)  
Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby,  
tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)  
Styrelseledamot: Åke Rohdin, Engelbrektsgratan 25A, 702 13 Örebro,  
tel. 019-18 53 60 (intern.org.)  
Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,  
tel. 011-16 26 87 (utveckling, intern.org.)  
Suppleant: Ingemar Nordin, Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,  
tel. 41 46 37 (kansliet)  
Suppleant: Bertil Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby,  
tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)  
Informationskommittén: Bertil Lindquist, Västermovägen 19,  
732 00 Arboga, tel. 0589-155 31.

## Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö  
Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö  
Telefon: 040-12 20 29  
Postgiro: 578-5  
Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.  
Skriftliga beställningar expedieras under hela året, även under sommaren.  
Expedition: Wivi Nilsson  
Styrelsens ordförande: Anita Lindblom.



## Enhavo

- 19 Pli ol unu miliardo da pundoj
- 20 75-jara: La Espero – Svenska Esperantotidningen
- 21 Sundsvall: La jarkongreso pliproksimiĝas
- 22 Vizitu Tanzanion!
- 23 TRA LA LANDO:  
Raporto de Okcidenta Regiono  
La klubo en Skövde: Sekcio en Skara  
Södra distriktet ordnar veckoslutskurs  
Insamling för Projekt Indien
- 24 TRA LA MONDO:  
Gyula alvokas la 25-an fojon IJS-88: Internacia Junulara Semajno en Hungario  
Postkongreso en Alkmaar  
Renkontiĝo por interlingvistoj kaj esperantologoj  
MEL alvokas muzikantojn kaj kantistojn  
Nordaj nordianoj serĉataj
- 25 Pasporta Servo  
Opinio: "Ludi kaj lerni"
- 26 Eugen Ryttenberg:  
Miaj Esperanto-rememoroj kiel junulo en Pollando
- 28 Recenzo: La knabino, kiu ne volis iri al infanejo  
Nekrologo: Gunnel Ek Thorborg
- 29 Jaro de Grabowski  
Agado E3
- 30 Internationella kursen på Nordiska Högskolan  
Heroldo al Italio
- 31 Solidare kontraŭ la malsato  
TEJO-gazeto pli aktuala  
Plano pri ekologia muzeo  
Mallonga raporto pri la leterkurso
- 32 Parolas Estona Radio en Esperanto

## Prezidanto:

### *Pli ol unu miliardo da pundoj*

La brita gazeto *Sunday Mirror* skribis la 30-an de aŭgusto 1987: "De unu jarcento oni konsideras Esperanton lingvo kreita de strangulo por aliaj stranguloj... ĉar neniu povis vidi en ĝi financan profiton. Ĉi-jare, la kosto por la impostpagantoj pro la rifuzo de burokratoj kaj politikistoj utiligi Esperanton en UN kaj la Komuna Merkato, kreskis al pli ol unu miliardo da pundoj. Meznombro kvardek horoj da studado farus el la funkciuloj fluajn parolantojn de Esperanto. Se ĉiuj uzus ĝin, oni ŝparus centojn da milionoj da pundoj."

La prezidanto de Monda Pacokonsilio (MKP), Romesh Chandra, Hindio, diris dum la seminario "Interhoma kompreniĝo - Interpopola paco" (vidu en *La Espero* 1/88): "Unu afero estas tute klara. Ni komencis kompreni la signifon de la laboro de la Esperantomovado". Kaj rezulto de la seminario estas interalie, ke MKP konsentas antaŭenigi la uzon de Esperanto kiel komunikilo ene de la pacmovado, konsilate kaj helpate de UEA.

En la Universala Kongreso en Varsovio reprezentigis la Unuiĝintaj Nacioj pere de Nigel Kasser, kaj li diris: "Estas interese vidi, ke tiom da homoj el tre diversaj landoj (6.000 el 73 landoj) komu-



**"Nikomencas kompreni la signifon de la laboro de la Esperantomovado."**

nikas libere. Gratulon." Li partoprenis dum la tuta semajno kaj vere povis konstati, ke la lingvo funkcias.

Amnesty International en Bulgario nun uzas Esperanton en siaj kontaktoj kun aliaj landoj. La sekcio en Arboga ricevis leteron en Esperanto el Bulgario, kaj petis min informi pri la lingvo. Nun ili komencis studi Esperanton per la kurso "Jen nia mondo", pruntita en la urba biblioteko.

Kie ajn homoj alproksimiĝas pli profunde al Esperanto, ili konvinkiĝas pri ĝia utileco kaj neceso kiel internacia lingvo.

Konstatante tion, mi denove ripetas al vi ĉiuj: Uzu ĉiujn eblecojn informi pri Esperanto en asocioj kaj ĉe unuopuloj.

**Karin Lindquist**



1913-1988

# 75-jara: La Espero – Svenska Esperantotidningen

Dum la 75 jaroj inter 1913 kaj 1988, aperis ĉ. 800 numeroj. Nombro de paĝoj inter 4 kaj 24, meznombro 10, faras 8000 paĝojn, kaj la dikeco de la tuta kolektaĵo estas ĉ. 50 cm. Tio estas nia revuo el statistika vidpunkto. Nun iom da historio:

Tio, kio okazis en Svedio antaŭ 1913, estas: La unua lernolibro por svedoj aperis en 1889. La Sveda Esperanto-Federacio fondiĝis en 1906. Svedaj Esperantogazetoj en tiuj unuaj jaroj estis: *Esperantisten*, redaktata de P. Ahlberg 1906-08. Post lia transiro al Ido, *Dana Esperantisto* servis kiel organo de SEF. La jarojn 1910-12 John Lundgren en Hedemora eldonis la gazeton *Sveda Esperantisto*. En Helsingborg G. H. Backman sporade eldonis sian *Esperanto-Folket* 1911-12.


Per la naskiĝo de *La Espero* finfine solviĝis la problemo pri federacia organo. Estis la Esperantosocieto de Gefle, Juna Espero, kiu en la jaro 1913 aperigis la unuan numeron de *La Espero*. Ĝia redaktoro estis la tiam 18-jara Rudolf Pehrsson, kiu spertiĝis per eldonado de la kluba gazeto *Esperanto-Folio*. Pro lia militservo, la redaktoran laboron transprenis John Lundgren (1915-18), sekvata de Paul Nylén (ĝis 1920). Dum ĉi tiu tempo, la presejo estis en Gävle ĝis 1919, kiam oni translokiĝis al Stockholm por esti pli proksime al la nova redaktoro. Henning Halldor en 1921 ekvidis la sorton de la federacia organo. Estante jam redaktoro de sveda fakgazeto, li posedis gravan sperton pri redaktado kaj eldonado. (Li estis ankaŭ kunfondinto de Eldona Societo.)

Dum siaj unuaj 12 jaroj, *La Espero* aperis en normala formato

de tiaj revuoj (hodiaŭ nomata A 4). Sed en 1925 oni malgrandigis ĝin al duona formato (nun A 5), provizis ĝin per verda kovrilo kaj duobligis la nombron de paĝoj. La titolo fariĝis *Svenska Esperanto-Tidningen*, kun subtitolo *La Espero*.

Kiam Halldor ekŝiĝis de sia posteno en junio 1927, Paul Nylén konsentis denove provizore redakti, ĝis kiam oni trovos novan entuziasmulon. En Ludvika loĝis kaj laboris tiam Bernhard Eriks-

son 1951 Bengt Joelsson estis preta surprizi la gravan taskon kunordigi la redakcian materialon. En julio 1953 li tamen petis ekŝiĝon kaj la redaktora stafeto estis transdonita al la tutsvedie kaj internacie konata Tiberio Morariu. Dum lia regado la frontpaĝo denove ŝanĝis aspekton, ricevante novan logotipon, kun *La Espero* kiel ĉefa nomo kaj *Svenska Esperanto-Tidningen* kiel subtitolo. Sune Ahlm kaj Franko Luin estis t.n. teknikaj helpantoj, ankaŭ sub



son kiel presisto. El lia presejo jam aperis kelkaj jarkolektoj de *La Espero*. Kiam li translokiĝis sin kaj sian presejon al Stockholm, montriĝis bona solvo elekti lin nova redaktoro. En lia presejo, Sture-Tryckeriet, oni presis la gazeton ĝis 1980! Li restis kiel redaktoro ĝis junio 1938. Dume, en la jaro 1935, oni reiris al la "normala" formato A 4.

La unua virina redaktoro fariĝis Eva Julin, kiam ŝi en oktobro 1938 akceptis tiun honoroficon. Ŝi kuraĝe strebadis dum la militaj jaroj ĝis novembro 1946. En februaro 1940 la verda koloro de la frontpaĝo malaperis - por ŝpari monon - sed ĝi reaparis en 1946, samtempe kun la nova redaktoro Oskar Svantesson.

Li eltenis ĝis 1950, kaj dum serĉado de posteulo, provizore redaktis Sune Ahlm (estante estro de Eldona Societo). Ek de aprilo

la redaktoreco de Åke Blomberg, kiu sekvis post la ekŝiĝo de Tiberio en 1969.

En julio 1977 Franko Luin kiel nova redaktoro donis novan aspekton al kaj la ekstero kaj la interno de la gazeto. Nova logotipo aperis kaj la verda koloro malaperis en 1973. Aliaj ŝanĝoj de la frontpaĝo okazis en 1976, 1978 kaj 1980. En 1981 oni malgrandigis la formaton pro tio, ke la presado estis transprenita al la propra presejo en Esperanto-Centro. La titolpaĝo denove fariĝis kolora dum kelkaj jaroj, ĝis 1984. En novembro 1983 Karin Lindquist transprenis la redaktoran titolon, kaj kune kun sia redakcia komitato ŝi daŭre gvidas la entreprenon, provante pluenliveri *La Esperon* al novaj generacioj.

La respondeca eldonisto de *La Espero* - kaj komence ĝia ekonomia garantianto - estis de 1913



gis 1973 W. Wahlund. Post lia forpaso estis elektita Bertil Åkerberg.

Estus interese iom citi el la diversaj jarkolektoj, sed, trafoli-umante ĉiujn revuojn de 1925 ĝis 1987, mi trovis, ke validas la sentenco "Nenio nova sub la suno" ankaŭ koncerne la enhavon de *La Espero*. Oni klopodis ĉiamaniere trovi rimedojn plimultiigi la membraron, kaj same provis ardigi la jam konvinkitajn por plua, pli rapida progreso. Oni penis trovi novajn vojojn por finaci la laboron. Sed ĉio ĉi-rilate sekvis la ĝeneralan evoluon de la socio; la



metodoj de antaŭ 50 jaroj, kaj la maniero lingve prezenti ilin, ŝajnas al ni hodiaŭ iomete naivaj. Nun novaj, kaj certe pli efikaj, metodoj progresigi nian aferon estos prezentataj al la legantaro de *La Espero*.

Restas do danki al ĉiuj kontribuintoj al la progreso dum la pasintaj 75 jaroj, kaj deziri ĉion bonan al la redakcioj laborontaj dum la sekvantaj 25 jaroj ĝis la 100-jara jubileo. Ĉar *La Espero* jam nun certe estas unu el la plej aĝaj daŭre aperantaj esperantaj revuoj, ni kun fiero povas ĝojkrii: Ni neniam perdos *La Esperon*!

Sune W. Ahlm

## Sundsvall

# La jarkongreso pliproksimiĝas

Ni povas sciigi kelkajn aldonojn al la programo, kiu aperis en *La Espero* 1/88:

Kiel prelegisto kontribuos *Kaarlo Voionmaa*, kiu momente partoprenas esplorprojekton pri lingvoj de enmigrintoj ĉe la lingvosciencia fakultato de la universitato de Gotenburgo. Li rakontos pri tio, kaj pri siaj propraj spertoj kiel enmigrinto el Finnlando. Li ankaŭ partoprenos la podian diskuton.

Ekzistas granda ebleco, ke *Jadwiga Gibczynska* el Krakovo, Pollando, venos al ni. Ŝi estas bone konata pro siaj prezentaĵoj pri la vivo de Zamenhof. En la kongreso ŝi intencas prezenti novan teatraĵon, kiu estas bazita sur la libro *La infanoj de Oldrovalo*.

Cetere ni povas sciigi kaj memoriĝi vin pri tio, ke la lasta aliĝdato je la ordinara kotizo estos la 17-a de aprilo.

## Gajaprogramo en Sundsvall

Kiel vi jam vidis en la kongresa programo, okazos aŭkcio dimanĉe je la 20-a horo.

Vi nepre partoprenu, ĉar ni vendos inter alie la restantajn librojn el la bibliotekoj de Carlén kaj Engholm.

Kiel kutime Thorsten Lund, Malmö, manovros la martelon, kaj se vi jam vidis lin en tiu okupo, vi ne volos maltrafi la spektaklon.

## Seminarium om kvinnors situation

I samarbete med UEA, SEF och Vuxenskolan anordnas ett seminarium den 26-29 maj i Högsby i Småland.

Föreläsare om kvinnors situation i olika länder blir *Jadwiga Gibczynska*, Polen, *Elisabeth Bormann*, Väst-tyskland, *Maire Mullarney*, Irland och riksdagsledamot *Ingrid Hasselström-Nyvall*, Sverige. *Audrey Childs-Mee* kommer att leda en Cseh-kurs i Esperanto.

Seminariet vänder sig till utländska och svenska esperantister, samt andra som intresserar sig för internationella frågor. Känner du någon du tror är intresserad av att delta i seminariet, INFORMERA OM DET!

För närmare information, hör av dig till *Kerstin Rohdin*, tel. hem 0491/20461, tel. arb. 0491/20920. OBS! Begränsat antal deltagare.



# Vizitu Tanzanion!

*Jen kontribuo de Bernard Nzanieye. Bernard naskiĝis en Burundo, sed vivis en Tanzanio dum la lastaj du jaroj kiel rifuĝinto. Li partoprenis en grupvojaĝo, aranĝita de UEA, kiu inkluzivis i a partoprenon en UK en Varsovio. Je invito de Anita Lindblom li venis al Svedio en oktobro kaj estis gasto ĉe pluraj kluboj, en kiuj li rakontis pri sia lando. Lia intenco estis reveni al sia hejmlando tuj post la rondvojaĝo en Svedio, sed tio ŝanĝiĝis. Li ankoraŭ restas, kaj lia espero estas starigi multajn kontaktojn inter Tanzanio kaj Svedio.*

Tanzanio kovras 937 062 km<sup>2</sup>. Ĝi situas en orienta Afriko kaj troviĝas inter 1o kaj 11o sude de la ekvatoro. Ĝiaj samlimaj landoj estas Kenjo kaj Ugando norde; Zairo kaj Burundo okcidente; Malavio, Zambio kaj Mozambiko sude. Oni trovas la monton Kilimanĝaro kun 5895 m super la maro, kaj troviĝas eĉ la lago Tanganjiko, la dua plej profunda lago en la mondo, 772 m.

Tanzanio havas ĉirkaŭ 120 tribojn kaj ĉiu tribo havas malsaman lingvon. La nacia lingvo estas la svahila kaj la angla estas la oficiala. La svahila estas la plej parolata en Afriko. Troviĝas pli ol kvin dek milionoj da svahilingvanoj en Tanzanio, Somalio, Madagaskaro, Mozambiko kaj Zairo.

En Tanzanio oni interesiĝas pri Esperanto. Troveblaj estas kluboj kaj grupoj de lernantoj, kiuj sekvas la kurson per korespondado. En tiuj grupoj multaj lernas de aliaj lernantoj. En tiu lando troviĝas ankaŭ memlernantoj dise en diversaj regionoj. La plej grava problemo por evoluigi Esperanton tie estas manko de

lerniloj. Tiuj, kiuj lernas per korespondada kurso, havas anglajn aŭ francajn klarigojn. Bedaŭrinda afero, ĉar nur kelkaj tanzanianoj povas lerni Esperanton per eksterlandaj lingvoj: Nur 10 % scias la anglan. Ni havas svahilan lernolibron, "Jifunze lugha ya Kiesperanto" (Lernu esperantan lingvon), sed ŝajnas malfacila por sin gvidi. La svahilingvanoj certe bezonas specialan apogon. Ni tre ĝojas, ke stokholma klubo en Svedujo ak-

ceptis ĝemeliĝi kun Esperanto-klubo Maendeleo, kaj ke Esperanto-grupo Heffenberg en FRG deziris rilati kun grupo de esperantistoj en Tanzanio. Estas ankaŭ aliaj, kiuj progresigas tiujn svahilingvanojn diversmaniere. Por efike instrui svahile, necesas nepre eduki kompetentajn gelemantojn, kiuj poste scios instrui Esperanton per siaj naciaj lingvoj.

Bernard Nzanieye

## SEFi Sundsvall

### Kongressavgifter *Pris Kod*

Kongress inkl. utfärd (buss, mat o. underhållning) t o m 17 april	175:-	A
Kongress inkl. utfärd efter 17 april	200:-	B
Utfärd till Spikarna 23/5	25:-	C
Kongressmärken, karta med 6 märken (självhäftande)	5:-	D
Ungdomar, plats i masslogi (ingår i kongressavgiften)	--	E

### Måltider:

Supé på Södra Stafsberget 21/5 (inkl. buss)	140:-	F
Alternativt ungdomsprogram på Åkersviks skola	50:-	G
Landgång med kaffe/te, kvällen 20/5	45:-	H
Dito kvällen 22/5	45:-	I
Konferenslunch 21/5	80:-	J
Dito 22/5	80:-	K
Eftermiddagskaffe 21/5	20:-	L

Betala till pg 481 43 95 - 2, SEF-jarkongreso, c/o Åke Näsholm, Linderbergsgatan 4, 852 47 Sundsvall.  
Ange på inbetalningskortet koderna för de poster du betalar för.



## Raporto de Okcidenta Regiono

Ciuj kluboj en okcidenta Svedio raportas pri studrondoj aŭ/kaj klubkunvenoj ĉiusemajne.

La klubo en Falköping daŭrigas siajn ĉiusemajnajn programojn en la proksimradio, kun anoncado, en tri diversaj lokaj gazetoj.

En la gotenburga regiono estas planata komuna aranĝo dum la Semajno de Internacia Amikeco. Daniel Durand el Francio prezentos la organizon Monda Fonduso Kontraŭ Malsato en la diversaj Esperantokluboj en Gotenburgo, Kungälv kaj Kungsbacka, kaj ankaŭ en lernejoj kaj aliaj societoj. Kungälv ankaŭ komencis plani por la nova semajna kurso en Nordia Popola Altlernejo en aŭgusto.

Laste la plej bona: Estas fondita nova klubo en Skara. Bonvenon en la kluban rondon!

Märtha

## La klubo en Skövde: Sekcio en Skara

Klubo Esperantista en Skövde daŭre kreskas laŭ membronombro. En la jarkunveno la jarraporto rakontis pri 62 membroj, kaj poste la cifero ankoraŭ altiĝis. Kialo estas parte la nova klubo en Skara, kiu ankoraŭ estas sekcio de la klubo en Skövde. "La skaraboj" vikle agadas, kun studrondoj trifoj po semajno, informaj libromarkoj en la urba biblioteko, ktp.

Tre varia, abunda kaj vere internacia estis la jaro 1987 por la

klubo en Skövde. Venis gastoj el Tanzanio, Brazilo, Hungario kaj Pollando, kiuj prelegis kaj aktoris. Multe da alio ankaŭ okazis dum la 17 klubkunvenoj kaj 3 ekskursoj. Funkciis kursoj por komencantoj, progresantoj kaj konversaciantoj. En la urba biblioteko estis ekspozicio. La sukcesa provo pri semajnfina kurso en lernejo, kiu aŭtune allogis sufiĉe multajn junulojn, estos pligrandigita printempe.

Al la estraro estis elektitaj Gunnar Olsson, prezidanto, Kurt Frisk, Sten Broman, Solveig Bertilsson, Anne-Marie Wångdahl, Inger Sjöberg kaj Bertil Johansson, kaj kiel reprezentantoj de Skara, Rune Andersson kaj Kjell Hall.

B.A.

## Södra distriktet ordnar veckoslutskurs

Den 28-29 maj 1988 kommer Södra distriktet att anordna en veckoslutskurs i Markaryd i samarbete med folkhögskolan där. Det kommer att bli grupper för nybörjare och mer avancerade. Grupp 4 kommer bli att studera Esperantos uttrycksmöjligheter och olika stilarter. För vidare upplysningar, vänd er till:

Andreasson,  
tel. 0415/501 52.

Avsikten med insamlingen var att hjälpa Esperantorörelsen i Indien med framställning av informationsmaterial och tryckning av ordböcker. Senare har framkommit att ett manus till en Esperanto-engelsk-bengalisk ordbok har utarbetats på privat initiativ, men att medel för tryckningen saknats.

Flera försök har gjorts att sända delbelopp till Indien, men pengarna har varje gång returnerats av den indiska banken. Det är enligt lag förbjudet att införa främmande kapital och litteratur i landet. Man är rädd för eventuellt stöd till omstörtande verksamhet. Undantagna är missionsförbund som driver skolor, sjukvård och hjälpverksamhet sedan flera år tillbaka.

Jack Snarberg har kontaktat UEA för att pengarna, 18 632 kr vid årsskiftet, ska överföras till UEA och användas uteslutande för Projekt Indien, bli så att ordböcker blir tryckta. Underhandlingar kommer att ske så snart UEA inkommit med svar. Givarnas uppfattning om bästa sätt att använda pengarna kommer att beaktas vid en eventuell överenskommelse med UEA.

I samförstånd med initiativtagarna Snarberg, Sjödin och Janheim, anser JEK:s styrelse, som skött insamlingen, att denna nu avslutats. Insamlade medel finns insatta på Sparbanken Alfa. Tack för det fina resultatet!

För Jönköpings Esperantoklubb  
Karl Buremo

## PLEJ KORAN DANKON

### Klubo Cent

Holger Lennings, Huskvarna	100:-
Hillevi Zachrisson, Linköping	100:-
Charlotte Andersson, Skövde	100:-
Börje Andersson, Skövde	100:-
Alice och Nils Johansson, Norrköping	200:-



## Tra la mondo

### Gyula alvokas la 25-an fojon

Por la 25-a fojo Somera Esperanto-Universitato en la hungara urbo Gyula aranĝos sian popularsciencan renkontiĝon inter la 1-a kaj 8-a de julio 1988.

La programo konsistos el Esperantlingvaj prelegoj pri instrumentodiko, romanverkisto Szatmari kaj moderna Japanio, hungaraj popoldancoj, Esperanto-teatro ktp. Posttagmeze du instruistoj pliperfektigos la lingvoscion de volontuloj.

Krome oni vizitos muzeojn, galeriojn, ekspoziciojn kaj urbajn vidindaĵojn. Komence estos interkona balo kaj fine adiaŭna balo. En la urbo estas banejo, kies termoakvo sanigas reŭmatismajn kaj ginekologiajn malsanojn.

La loĝigo estos en hotelo aŭ en kvarpersonaj ĉambroj. Detalan programon oni povas havi de: Somera Esperanto-Universitato, 48-as u. 11, H-5700 Gyula, Hungario.

### IJS -88: Internacia Junulara Semajno en Hungario

Simile al la pasintjara aranĝo, Hungara Esperanto-Junularo denove organizas internacian junularan ferian semajnon en la sudhungaria urbo Szeged inter la 10-a kaj 16-a de julio 1988, en la semajno tuj antaŭ la IJK. Por la partoprenantoj estos organizita karavana vojaĝo al IJK, okazonta en Zagrebo.

La programo antaŭvidas: Noktan banejon, bivakfajrojn, ekskursojn kaj aliajn distrajn programerojn, krome kelkajn serio-

zajn, kiel mediprotektado, politika forumo pri Hungario, ktp.

La organizantoj atendas ĉirkaŭ 200 esperantistojn. Dum la semajno oni loĝos en aparta ripozejo en 3 ĝis 6-litaj ĉambroj, tuj apud la rivero Tisza (Tibisko). Ankaŭ eblas tendumi per propra tendo. La kotizo inkluzivas: Loĝadon, manĝojn kaj programon. Estas planata elektebla, tuttaga ekskurso al Rumanio. Pliaj informoj kaj aliĝiloj haveblas de: Hungara Esperanto-Junularo, Pk. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

### Postkongreso en Alkmaar

La Esperanto-grupo en la nederlanda urbo Alkmaar aranĝos inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto 1988 postkongreson al la UEA-kongreso en Rotterdam.

La postkongreso estas nomata Turisma Esperanto-Kongreso. Oni povas fariĝi honora kongresano per pago de 50 guldenoj al poŝtbankkonto 627337 de la UK en Rotterdam, indikante "Donaco TEKA".

### Renkontiĝo por interlingvistoj kaj esperantologoj

La sekva, 16-a Scienca Interlingvistika Simpozio okazos en Varsovio inter la 27-a de aprilo kaj 1-a de majo 1988, sub aŭspicio de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo de UEA. La aranĝo fariĝis jam tradicia preleg- kaj diskutforumo, kiu kunvenigas fakulojn kaj aliajn Esperantomovadanojn interesitajn pri diversaj aspektoj de internacia

lingva komunikado. La simpozio estos dediĉita al la temo "Lingvokomunikado kaj lingvo-planado". La ĉeftemon la organizanto - Akademia Centro Interlingvistika - proponas pridiskuti laŭ jenaj subtemoj:

1. Kultura kaj socipolitika aspektoj de la lingvo-planado.
  2. Sociologio de internacia planlingva parolkomunumo.
  3. Specifeco de Esperanto rezultanta el ties planiteco.
- Laŭ sugestoj de pasintjaraj partoprenintoj, dum la simpozio okazos ankaŭ diskuto pri:
4. Strategiaj demandoj de interlingvistiko.

Interesatoj povas ricevi detalaĵn informojn de: Akademia Centro Interlingvistika, Ordynacka 9, PL-00-950 Varsovio, Pollando.

### MEL alvokas muzikantojn kaj kantistojn

Muzika Esperanto-Ligo alvokas ĉiujn, kiujn interesas muziko kaj kanto, aliĝi al la Ligo. Ĝi havas membrojn en la tuta mondo, kaj interalie prizorgas la Internaciajn Korusojn dum la Universalaj Kongresoj.

Prezidanto estas Dimitro Terziev, Sofio. La estraro havas unu membron el Svedio, Gunnar Olsson, Skövde, kiu estas ankaŭ landa peranto. La jarkotizon, 60 kronoj, svedoj povas pagi al MEL, poŝtgira konto 425 00 78 - 5. Kelkfoje dum la jaro venos membrogazeto.

### Nordaj nordianoj serĉataj

Ĉu troviĝas (krom en Tromsø) Esperanto-uzantoj norde de la arka Cirklo? En tiu unike internacia regiono de Nordio, kie la ĉiutage parolataj lingvoj estas la



finna, la lapona, la rusa kaj la skandinavaj? Bonega tereno por montri la funkcion kaj neceson de Esperanto, ĉu ne?

Ni povus ekzemple enplektiĝi en la diversaj "nordkalotaj" organizoj kaj aranĝoj, viziti unu la alian translime, utiligi la sistemon de ĝemelurboj, ktp... Estas multo por fari!

Mi jam havas kontakton kun Murmanskanoj. Sed kie estas vi, finnoj kaj svedoj? Mi optimisme atendas viajn leterojn kaj ideojn.

Marianne Lund  
Breivika studentbolig G-14  
N-9000 TROMSØ



## Kongress- brevmärken

Använd och propagera för Sundsvalls-kongressen!  
Köp kongressmärken hos

SEF-Jarkongreso,  
c/o Näsholm,  
Linderbergsvägen 4,  
852 47 Sundsvall,  
pg 481 43 95 - 2.

1 ark = 6 märken kostar 5:-  
5 ark = 30 märken kostar 20:-

Motivet är skvadern. Det är ett djur hopsatt på skämt av en hares framkropp och en tjäders bakkropp. Den har blivit ett slags maskot för Sundsvall.



# Pasporta Servo

Att resa idag är lätt och allt fler utnyttjar den möjligheten. Pasporta Servo har funnits sedan 1974, och listan innehåller nästan 800 gästgivare från 53 länder som är beredda att ta emot dig under några dagar (ibland längre) när du är på resande fot. Det är en unik möjlighet att lära känna människor och länder över hela världen.

Alla har dock kanske inte möjlighet att resa hur de vill. Du kanske ändå tycker att det låter roligt att ställa upp som gästgivare under en eller ett par dagar där du bor. Även detta är ett sätt att få vänner från många olika länder.

Om du vill ställa upp som gästgivare eller vill köpa Pasporta

Servo-listan för att använda själv, ska du kontakta:

Sara Török,  
Stamgatan 56,  
125 37 ÄLV SJÖ

eller

Wim Posthuma,  
Soldatgatan 40,  
723 45 VÄSTERÅS

Hos Sara eller Wim kan du också få ytterligare information om hur Pasporta Servo fungerar.

Jag vill själv passa på att tacka alla (gästgivare m fl) som jag haft kontakt med såsom "landarorganizanto" för Pasporta Servo i Sverige. Jag lämnar nu över uppgiften till Sara Török.

Elisabeth Ahlgren

## Opinio

# "Ludi kaj lerni"

Att få deltagare i nybörjarkurser att börja tala Esperanto är inte alltid det lättaste. Själv har jag vid några tillfällen använt kortspelet "Ludi kaj lerni" och det fungerar verkligen, men det har den nackdelen att det tar förfärligt lång tid att spela det. För någon tid sedan kom ett brev från Sigita Zilionis i Vilnius i Litauen, som haft samma erfarenhet som jag. Han har dessutom ett förslag till åtgärd, vilket följer av nedanstående utdrag ur hans brev:

"La kartludon mi tuj ekprovis en la klubo. Ĉeestis ĉirkaŭ 6-7 ludantoj, kaj unue ni provis ludi laŭ la reguloj aldonitaj. Tamen mi devas konfesi, ke la ludo ne estis tre interesa. Ĝi estis enua. La ludanto devas peti iun konkretan karton, kaj estas ege malgranda ebleco, ke la alia ludanto ĝin havos. Do oni demandadas unu la

alian kaj preskaŭ neniu evident-igas havi la karton bezonatan. Tiam ni ŝanĝis iomete la regulojn kaj la ludo ekestis pli interesa. Mi volus ĉi tie skribi al vi pri la reguloj, laŭ kiuj ni ludis.

La ĉefaj ŝanĝoj en la reguloj estas jenaj:

1) Oni petas ne iun konkretan karton, sed iun ajn karton de iu konkreta serio;

2) Se la demandito ne havas eĉ unu karton de la petata serio, li transsendas la peton (la saman peton!) al la sekva ludanto;

3) Oni ne disdonas ĉiujn kartojn de komenco, nur po 3-6 kartojn, la resto estas "banko".

De föreslagna regeländringarna förefaller vettiga. Prova och se själv! "Ludi kaj lerni" kan vara ett utmärkt sätt att få igång Esperantotalandet.

Haldo Vedin



# Miaj Esperanto-rememoroj kiel junulo en Pollando

De la plej junaj jaroj ni infanoj en mia familio sciis, ke Ludoviko Zamenhof "faris lingvon". Tio ne estis por ni kaŭzo por pli granda atento. Somere 1919, kiam Pollando reliberiĝis, revenis al la patrujo Antoni Grabowski, kiu laboris en Ruslando kiel inĝeniero. En tiu periodo li laboris pri la traduko de la granda poemo de Adam Mickiewicz, "Sinjoro Tadeo". Tiun someron mi pasigis en la kamparo ĉe la familio de Feliks Zamenhof. Iun tagon Grabowski vizitis Felikson por havi konsilon pri kelkaj lingvaj esprimoj. Dum momento mi ektroviĝis sur la verando sola kun Grabowski. Li diris: "Tio estas Esperanto... facila lingvo... gazeto... blanka papero... nigraj literoj sur blanka papero..." Mi jam komencis en la lernejo la francan kaj la latinan, kaj mi ekmiris, ke mi komprenas, kion li diras.

Post la somero, reveninte al la lernejo, mi rimarkis en la koridoro papereton kun sciigo, ke kurso de Esperanto komenciĝas... ktp. Gin iniciatis du pli aĝaj kolegoj, Parnowski kaj Weinstein. Mi aliĝis al tiu kurso kaj mia esperanta neĝglobeto komencis ruliĝi. Tuj mi volis oficialigi mian novnaskitan intereson kaj aparteni al iu organizo. Mi aŭdis, ke la laborista Esperanto-societo "Laboro" akceptis junajn lernantojn al sia junulara sekcio. Mi vizitis la prezidanton de la varsovia filio, Kosicki, kaj membriĝis. Mi volis aktivi, kaj fariĝis asista vic-sekretario de la sekretario Domoŝlowski. Li venis preskaŭ ĉiutage al mia hejmo kaj lasis iun taskon, precipe ion por netaŝkribi. Tie mi renkontis miajn unuajn samideanojn, Isaj Dratwer kaj Aleksandro Hartman.

Post la fino de la gimnazio mi

komencis studi en la jura fakultato de la varsovia universitato. Tiam mi membriĝis en la studenta Akademio Esperanto-Rondo "Aero". Sekvis tre agrabla periodo: kunsidoj, kursoj, prelegoj, festoj. Pro diversaj kaŭzoj mi interrompis la "junan aventuron", pri kiu mi havis nek talenton nek intereson, kaj turnis min al por mi pli konvena tekniko. Sekvis la studentaj jaroj en Francujo, kiuj estis eble la plej feliĉaj kaj senzorgaj en mia vivo. Kompreneble mi tuj envoliĝis en la Esperantomovado en la regiono de Lyon.

De Francujo mi revenis hejmen haltante en Antverpeno por la Universala Kongreso de 1928, kiu estis mia unua. Poste sekvis jaroj de profesia laboro, interplektitaj kun aktiva kaj interesa agado por Esperanto. En tiu periodo aktivis en Varsovio kelkaj grupoj. Krom la ĝenerala Pola Esperanto-Asocio ekzistis "Konkordo", kun speciala akcento pri "homaranismo" kaj "interna ideo", la plej aktiva studenta "Aero", kun kelkaj centoj da anoj, la socialista "Laboro" kaj ankaŭ la malgranda kuracista rondo kun sia prezidanto d-ro Róbin, kiu tiam estis ankaŭ prezidanto de TEKA (Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio). La Zamenhofoj estis strikte neŭtralaj, tamen helpemaj se bezone. Tre aktiva en Varsovio estis la francino s-ino Cense, dum kelkaj jaroj antaŭ 1939 ankaŭ la bela svedino Siri Backman, kiu superis la verdan amason per preskaŭ kvarona metro. La t n delegitaro, t e elektitaj delegitoj de ĉiuj kluboj, regule kunvenis. La ĉefa kapo kaj kondukanto de la Esperantomovado en Polujo estis de ĉiuj estimata kaj ŝatata profesoro Bujwid, kiu loĝis en Krakovo, sed ofte

estis en la ĉefurbo. Li estis mondfama bakteriologo, disĉiplo de Pasteur, amiko kaj kolego de Koch. Tiu fakto savis lin de aresto, kiam la germanoj okupis Krakovon. Por subigi la popolon, ili batis unue kontraŭ la kultura elito, do ili de komenco arestis ĉiujn profesorojn. Sed dum la traserĉado en la hejmo de prof. Bujwid, ili trovis lian abundan korespondadon kun Koch kaj tial ne kuraĝis lin aresti. Generale mi kredas, ke la Esperantomovado estis simila en ĉiuj eŭropaj urboj.

De tempo al tempo okazis vizitoj de eksterlandaj samideanoj, kio okazigis iom da momenta propagando, ekz. kiam venis la hindu Sinha kaj ni organizis serion da publikaj prelegoj kun samtempa interpretado. Alifoj venis Hugo Steiner de Vieno por peti de la familio Zamenhof ion por sia muzeo. Alian fojon okazis vizito de "sveda" esperantisto Artur Svensson el Stokholmo. Notu, ke tiam la internaciaj kontaktoj ne estis tiel oftaj, kiel nun. Tiu gasto aspektis tute svede. Kiam li en la klubo unue salutis "svedlingve", kaj poste demandis "Ĉu vi komprenas?", la hora respondo estis "Nee". Li do salutis en Esperanto per kelkaj frazoj. Tondra aplaŭdo. Poste evidentiĝis, ke la blasfemita fiulo trompis nin ĉiujn: Li tute ne estis svedo, sed polo el urbo Lublin, kaj li arogante antaŭplanis tiun ŝercon. Ĉar li ne trovis en Varsovio iun svedan ĵurnalon, li aĉetis malnovan norvegan, lernis parkere unu frazon, enmiksitis la vortojn sveda esperantista, riskante (kun plena sukceso), ke neniu komprenus, kaj li povis triumfe ridegi. Poste li skribis pardonpetan karton. Li estis s-ano Pruski el Lublin. Depost tiam ni



nomis lin "prusa svedo".

En la jaro 1933, antaŭ la kongreso en Köln, ekflamis akraj diskutoj, ĉu bojkoti la kongreson por manifesti la kontraŭhitleran pozicion. Kelkaj estis kontraŭ la bojkoto por defendi la situacion de la germanaj esperantistoj. Fine neniu polo partoprenis tiun kongreson, kiu ja okazis laŭ ordono de Hitler nur por uzi la okazon por lia propra propagando, kaj poste malpermesi tutan agadon en la lando.

En 1931, laŭ iniciato de kapt. Silhan, komenciĝis kurso de Esperanto por blinduloj. En tiu laboro multe helpis la partopreno de la hungara blinda esperantisto Imre Ungar, kiu kun la helpo de varsoviaj samideanoj estis veninta al nia urbo por partopreni en la prestiĝa internacia Chopin-kurso por junaj pianistoj, kiun li venkis. Dum mia laboro kun blinduloj mi rimarkis, ke mankas konvena lernolibro en brajla skribo. Mi verkis tian. Guste en tiu tempo la polaj blinduloj ricevis de Usono la unuan brajlan presmaŝinon. La unua libro presita brajle en Pollando estis tiu Esperanto-lernolibro.

La tempo pasis kaj la Ora Jubileo proksimiĝis. Varsovio estis natura loko por tiu kongreso. Por LKK ne estis facila tasko organizi la kongreson du jarojn antaŭ la granda katastrofo. En Germanujo Hitler jam sukcesis trompi la pli grandan parton de sia popolo kaj per aĉaj mensogoj paŝon post paŝo konduki la mondon al abismo.

Ankaŭ en nia propra movado la personaj kaj financaj faktoroj kaŭzis disrompon. Parto de la landaj asocioj restis ĉe UEA, sed la pli granda parto transiris al IEL. Unue venis al Varsovio el Genevo tiama direktoro de UEA, Hans Jacob. Poste venis el Anglujo Cecil Goldsmith. UEA eldonis oran jubilean jarlibron kaj IEL eldonis oran jubilean jarlibron. Intertempe vizitis nin ankaŭ Ernfrid Malmgren el Stokholmo por kontroli la situacion, esperante havi grandan svedan grupon. Mi mem ricevis la taskon pri "fakaj kon-

greso". En praktiko tio signifis, ke mi organizis, sub la estreco de Jan Silhan en Krakovo, la kongreson de UABO en la ejo de la Blindul-instituto, kiu disponigis sian domon por tiu celo. La sekretario de UABO estis la surd-mutblinda svedo Harald Thilander, redaktoro kaj presisto de de la brajla gazeto "Esperanta Ligilo". Dum la kongreso li estis honorigita per la alta ordeno Polonia Restituta.

Ciuj kongresanoj ricevis senpage la oran libron, kiun redaktis s-ino Cense. En la fino de tiu libro kelkaj elstaraj esperantistoj respondis la demandon: Kion vi opinias pri la stato de Esperanto post kvindek jaroj, do en 1987? La ĝenerala respondo estis: Esperanto progresos, sed malrapide.

Kelkajn monatojn antaŭ la kongreso ni dungis s-ron Tiberio Morariu por Ĉe-metodaj publikaj kursoj. Li faris la faman intervuon kun Kabe por Heroldo. Bedaŭrinde Tiberio ne povis resti pli longe, lin anstataŭis Julio Baghy, kiu, krom daŭrigo de la kursoj, ankaŭ preparis la teatran prezenton, kiun li reĝisoris kaj ĉefrolis.

Se mi skribas pri miaj rememoroj de la intermilita periodo, mi

ne povas preterlasi mian viziton ĉe unu el la plej grandaj polaj poetoj, Julian Tuwim. La futurismaj kurentoj lanĉitaj de la italo Marinetti kaj poste de la ruso Majakovski, estis varme akceptitaj de la juna pola skolo de poetoj grupitaj ĉirkaŭ Tuwim. Mi tradukis kelkajn poemojn en Esperanton. Tuwim akceptis min tre afable kaj donis sian permeson publikigi. Ili aperis en Pola Esperantisto. Li diris, ke li mem, antaŭ ol komenci verki polajn poemojn, tradukis en Esperanton kelkajn verkojn de alia pola poeto, Leopold Staff. Li informis min, ke Esperanto estas la naŭa lingvo, en kiun tradukiĝis liaj verkoj.

La du sekvaj jaroj post la Ora Jubileo estis pli kaj pli ombrigitaj per apokaliopsaj nuboj, ĝis la neforgesebla mateno la 1-an de septembro 1939, kiam la unuaj bomboj super Varsovio eksplodigis la plej teruran inferon en la moderna historio, kiun la barbaraj hordoj de Hitler kun la helpo de Stalin kiel peston verŝis sur la mondon, mortigante kaj priŝtelante la eŭropajn popolojn unu post alia. Kiom da miloj kaj miloj da niaj senkulpaĵ samideanoj pereis en tiu torento?

Eugen Rytenberg

## Plej koran dankon!

### Donacoj

Mellanskånes Esperantoklubb	
"Till Sven Hanssons minne"	100:-
Majken och Märtha	
"Till minne av Maria Langhe"	100:-
Britta Lindeberg	
"Memore al Olle Persson"	50:-
Erik Lundevall, Borlänge	500:-
Familio Krondahl, Linderöd	
"Vår hyllning till Maria Langhes minne"	100:-
Claes Göran Ingestedt, Vällingby	100:-
G. A. Larsson, Örebro	100:-
Harry Nordlöf, Johanneshov	100:-

SEF



## Recenzo

# La knabino, kiu ne volis iri al infanejo

La knabino kiu ne volis iri al la infanejo

(de Siv Widerberg kun desegnoj de Cecilia Torudd. El la sveda tradukis Malte Markheden.)

Mi tre ĝojis kaj multe ridis legante ĉi tiun libreton. Ĝi temas pri knabineto, kiu iun tagon subite ne volas iri al la infanejo. Ŝi ĉion faras por malhelpi, ke la patro kunportu ŝin tien. Komence la knabino eĉ ludi ne volas tie, sed post iom da tempo ŝi komencas

bone farti kaj forgesas sian malbonan humoron. Posttagmeze, kiam la patrino venas por venigi ŝin hejmen, la knabino ne volas. Kial ĝuste nun, kiam ŝi tiel bone ludas? Nun la cirko denove komenciĝas.

Ĉi tiu libreto estas interesa ankaŭ por tiuj infanoj, kiuj ne iras al infanejo. Ankaŭ ili simile kondukas. La fabelo bone helpas al la infanoj rekoni kaj kompreni sin mem en tiaj situacioj. Ankaŭ la gepatroj, kiu kelkfoje devas travivi tian malfacilan kaj penan afe-

ron, povas bone amuziĝi. Kiel patrino de dujarulo, mi havas similiajn spertojn. La fabelo sendube estas prenita el la reala vivo. Oni certe volonte de tempo al tempo rerigardos ĝin pro la multaj amuzaj detaloj.

La teksto estas facila, amuza kaj skribita laŭ la pensmaniero de infana kapeto. La bildoj estas multkoloraj, la figuroj karaj, kun ĉarme trafaj movoj. Estas rimark-eble, ke la fabelo temas pri bona familio, malgraŭ ĉiuj iliaj problemoj.

D-ro Aleksandro Gofen, tradukisto el Moskvo, kaj d-ro Gilsu So, Sudkoreio, kontrolis la tekston. Eldonis Progreso Eldonejo en Motala.

Beatrix Svenonius

## Nekrologo Gunnel Ek Thorborg

La 6-an de januaro mortis Gunnel Ek Thorborg post longa tempo de grava malsano.

Gunnel aliĝis al studrondo en 1974 kaj fariĝis fidela esperantisto. Ŝia talento kaj lingvoscioj plenvalore efikis en sia profesio kiel interpretisto kaj turisma gvidanto. Ŝia rajtigilo de profesia gvidanto entenis ne nur la anglan kaj germanan lingvojn, sed ankaŭ Esperanton. Si estis la sola, kiu havis Esperanton en la rajtigilo, kaj pri tio ŝi estis fiera.

Dum la UEA-kongreso kaj dum la kongreso de la blinduloj en 1980, Gunnel ĉiutage deĵoris kiel Esperanto-parolanta gvidanto dum rondveturoj kaj ekskursoj. La lasta fojo, kiam Gunnel gvidis esperantistojn kaj esperante rakontis pri vidindaĵoj, estis dum la jubilea kongreso de SEF en Stokholmo en aprilo pasintjare.

Laŭ peto de blinduloj, Gunnel ankaŭ surbendigis lernolibron de Esperanto.

Ni memoru ŝin kun ĝojo kaj dankemo!

Gun Gerdman

## Vinn 5 000:— på SEFs lotteri "Espero 88"

Under förutsättning att vi får tillstånd från lotterinämnden anordnar SEF ett rikslotteri, s.k. kvicklotteri under hösten 1988.

Ska den idén lyckas är det viktigt att vi alla ställer upp och hjälper till.

Nu går vi ut med en förfrågan för att undersöka hur många lotter vi förmår sälja. Tänk därför snabbt och positivt efter hur många lotter DU och DINA VÄNNER ska köpa. Svara på talongen senast 30 april.

Lotterna kommer bara att kosta 20:—.

### VAD KAN MAN VINNA?

Om vi säljer 10 000 lotter blir vinsterna följande:

- 11 högvinster i form av Svenska Statens premieobligationer
- 400 presentkortsvinster (livsmedel för 100 – 500 kronor)
- totalt vinstvärde 100 000 kronor.

SEFs lotterikommitté består bl.a. av Börje Andersson, Kerstin Rohdin, Lennart Svensson.

KÖP MINST 5 LOTTER PER PERSON!

### INTRESSEANMÄLAN

Sänd talongen till Espero 88, c/o Lennart Svensson, Allégatan 11 B, 682 00 Filipstad, senast 30 april 1988.

Jag är intresserad att köpa ..... st. lotter à 20:— i kvicklotteriet ESPERO 88.

Namn: \_\_\_\_\_

Adress: \_\_\_\_\_



*Jubileo 1988*

# Jaro de Grabowski en Pollando

“Okaze de:

- La 100-jariĝo post la eldono de la unua libroforme eldonita literatura verko en la Internacia Lingvo: “La neĝa blovado” de Puŝkin, tradukita fare de Antoni Grabowski

- La 80-jariĝo post la fondo de Pola Esperantista Societo, kies unua prezidanto estis Antoni Grabowski

- La 80-jariĝo de la Akademio de Esperanto, kies kunfondinto, membro kaj direktoro de la Gramatika Sekcio estis Antoni Grabowski

- La 75-jariĝo post la eldono de la unua antologio de poezio en Esperanto, “El parnaso de la popoloj”, kies aŭtoro-tradukinto el 29 naciaj lingvoj estis Antoni Grabowski

- La 70-jara ekzisto en Esperanto de la plej grandioza pola epopeo: “Sinjoro Tadeo” de Adam Mickiewicz, majstre tradukita fare de Antoni Grabowski

- Kaj la nunjara datreveno 130-a de la naskiĝo de la “Patro de esperanta poezio”.

La Ĉefa Konsilio de Pola Esperanto-Asocio decidis, ke la jaro 1988 estu “Jaro de Grabowski”, dezirante omaĝi la grandan filon de la pola popolo kaj elstaran esperantiston, kiu certe estis Antoni Grabowski.”

Tio estas la komenco de la 8-paĝa, dense presita, enhaviĉa programo de la Jaro de Grabowski. Dum la tuta jaro okazos seminarioj, ekspozicioj, koncertoj, spektakloj, konkursoj, ktp.

La celoj estas i a konatigi al esperantistoj la vivon, aktivadon kaj verkadon de Antoni Grabowski; konatigo de la verko “Sinjoro Tadeo”, la perlo de la pola litera-

turo; popularigado de la ideo de la Esperanto-Centro en Bjalistoko kaj de la Fondaĵo Grabowski.

Se vi interesiĝas, skribu al:

Pola Esperanto-Asocio,  
Ĉefa Estraro,  
Ul. Jasna 6,  
PL-00-013, Warszawa,  
Pollando,

indikante surkoverte “Grabowski”.

## Martha Colliander 100-jara

Martha Colliander fariĝos 100-jara la 24-an de aprilo ĉi-jare. Si estas certe nia plej maljuna membro.

Dum multaj jaroj ŝi estis aktorino kaj ludis kaj en teatroj kaj en televido. Ŝi kelkfoje ankaŭ ĝojigis la membrojn de la stokholma klubo recitante konatajn verkistojn.

Ni kore gratulas.

# Agado E3

“En preskaŭ ĉiuj evolulandoj ekzistas giganta problemo: blindeco. Laŭ la Mondorganizo por Sano, vivas en la mondo pli ol 40.000.000 blinduloj. Ok el dek troviĝas en la Tria mondo. Multe pli altan nombron konsistigas malforte vidantaj homoj kaj suferantoj de okulmalsanoj kun evidente malkreskanta vidkapablo. Jam pli ol unufoje oni konstatis, ke tri el ĉiuj kvar blinduloj en la evolulandoj estas nenecese blindaj. Ilia blindeco, sekve, estas preventebla aŭ kuracebla. Oni kalkulis, ke, se la zorgado preventa kaj kuraca ne draste plifortiĝos, la nombro de blinduloj duobliĝos ĝis la jaro 2000!”

Tion skribis Jacques Tuinder en artikolo pri la nenecesa blindeco en la Tria mondo. Li rakontas pri la okulkuraca laboro al kiu AGADO E3 kontribuas, kaj rakontas inter alie:

“La plej multaj operaciojn, kiuj celas forigi la lenson kaj grandparte ripari la vidpovon, oni faras per t n ‘surradaj klinikoj’ (aŭtobusoj), kiujn veturigas al kamparaj vilaĝoj volontulaj

organizaĵoj. Dank’al multe uzata tekniko plisimpligita, nun eblas operacii kataraktulon en tempo relative mallonga kun sukcesa rezulto.

Alia formo de blindeco oftas precipe ĉe junaj infanoj. Ĝin kaŭzas nebona nutrado kaj nesufiĉo da necesa vitamino. Se kuracisto ne frutempe diagnozas, ke ĉe infanoj malpli ol sesjaraj troviĝas simptomoj de tiu ĉi okulmalsano, tre granda estas la risko, ke ili neniam plu povos vidi...”

Jacques Tuinder, la iniciatoro, finas:

“Subtenu la okulkuracan laboron. Informojn donas kaj donacojn volonte akceptas:

Porblinda Agado E3,  
Henegouwenlaan 35,  
1966 RH HEEMSKERK,  
Nederlando.  
Poŝtĉekkonto 1020100.

Temas pri pli ol dudekjara kampanjo por solidareco, kiun montras samideanoj rilate al vidhandikapuloj en la evolulandoj, laŭ la spirito de de la pola okulisto D-ro L.L. Zamenhof.”

## Kungälv

# Internationella kursen på Nordiska Folkhögskolan

Som förut meddelats, blir det en ny internationell kurs på Nordiska Folkhögskolan i Kungälv den 8-12 augusti 1988. Kursfolder med anmälningsblankett kan beställas från Nordiska Folkhögskolan, Box 1001, 442 25 KUNGÄLV eller från Kungälv's Esperantoklubb, c/o Solveig Ek, Rödbo Stafettgata 13, 442 90 KUNGÄLV.

Audrey Childs-Mee och Andreo Pettyn blir två av de fyra lärarna. Ett mer detaljerat kursprogram kommer i nästa nummer av *La Espero*.

Liksom förra året kan man söka dagsstudiestöd och få ersättning för både inackorderingskostnad och förlorad arbetsinkomst. Det innebär bl a att man inte behöver använda semesterdagar för att delta i kursen. Alla kan söka, pensionärer och hemarbetande såväl som förvärvsarbetande. Om man får ansökan beviljad kan bero på olika saker, bl a på tidigare utbildning. Man kan få bidrag för högst 10 dagar/år, samt två resdagar. Blankett för ansökan kan hämtas hos arbetsförmedlingen, eller beställas från Vuxenutbildningsnämnden i ditt län, dit ansökan också skickas. Den ska vara inne senast 15 maj om du vill delta i kursen i Kungälv.

Det finns ytterligare stipendier att söka. Esperanto-Institutet delar ut ett antal stipendier à 300 kr, och Gustafsbergsföreningens stipendiefond i Uddevalla ett eller ett par stipendier à 500-1000 kr. Ansökan till Esperanto-Institutet kan skickas till Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 GÖTEBORG, och vad gäller Gustafsbergsföreningen,

till Erik Hansson, Femkronorsvägen 3, 451 73 UDDEVALLA. Denna fond är avsedd "att främja ungdomsutbildning till i Bohuslän uppvuxna, behövande och skötsamma ungdomar såväl pojkar som flickor". Det innebär alltså att man ska ha anknytning till länet, vara född där, även om man sedan har flyttat därifrån. För ytterligare upplysningar kan du också kontakta

Märtha Andréasson,  
2265 Tolsered,  
425 90 HISINGS KÄRRA,  
tel. 031/57 11 33.

Ansökningstiden går ut i början av maj. Givetvis ka de här stipendierna och dagsstudiestödet sökas för kurser var som helst i landet. Observera reglerna för senaste ansökningdag vad avser dagsstudiestöd.

Märtha Andréasson

## "Heroldo" al Italio

En sia 67-jara internacia vivo, "Heroldo de Esperanto" - la dua plej legata kaj la plej ofta periodaĵo en Esperanto - trapasis kelkajn etapojn. Ĉiu el ili signifis por la gazeto gravan svingon kaj esencan progreson.

"Heroldo" naskiĝis en Kolonjo en 1920, fare de Teo Jung, sed rifuĝis en Nederlando kun sia fondinto antaŭ la Dua Mondmilito, por savi sin de naziaj persekutoj. En 1962 la nuna redaktoro transprenis la gazeton al Bruselo kaj flegis ĝin tie 17 jarojn.

En 1979 "Heroldo" denove sekvis la redaktorinon; ĉi-foje temis pri Madrido, kie la edzo, Gian Carlo Fighiera, deĵoris dum 9 jaroj kiel funkciulo de la Monda Turisma Organizaĵo.

Nun, komence de 1988, li definitive revenos al sia naskiĝurbo, kie li fruemeritiĝos kaj laboros kiel sendependa konsilisto pri kongresa turismo. Tial "Heroldo" daŭrigos sian aperadon en Torino, la historia ĉefurbo de Italio.

La nova etapo de la gazeto antaŭvideble restos stabila dum multaj jaroj. Ĝi startos sub tre

favoraj cirkonstancoj. Plej unue, la redaktoro ricevos gravan edzan helpon. Due, "Heroldo" aĉetos komputilan kompostmaŝinon. Trie, la redakto-ritmo kaj la presado fundamente plirapidigos - estos komplete eliminitaj la lastatempaj bedaŭrindaj malfruoj.

Pludaŭros, evidente, la vendado (pere de libroservoj) de la tri sukcesaj lernolibroj de "Heroldo": "Paŝoj al plena posedo" (5 eldonoj) de W. Auld, "Nuevo método de Esperanto" de F. de Diego kaj "Nouvelle méthode d'Espéranto" de E. Ludwig kaj R. Triolle.

Ni ĉiuj deziru al la nova "Heroldo de Esperanto" sukceson!

*Noto:* Ekde mezo de januaro 1988, bonvolu ne plu sendi korespondaĵojn al Madrido, sed uzi la novan adreson:

Ada Fighiera-Sikorska,  
"Heroldo de Esperanto",  
Via N. Sandre 15,  
I-10078 Venaria R.-Torino  
(Italio).



*Alvoko*

# Solidare kontraŭ la malsato

La asocioj, kiuj iel ajn dediĉas sin al la loĝantaroj de la malriĉaj regionoj, estas multnombraj, dum la apogoj, kiujn ili trovas en la riĉaj landoj, ofte estas malfortaj rilate al iliaj celoj.

En tiaj cirkonstancoj, la kreado de nova asocio, kiel **Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato** ŝajnas neĝustatempa sen tiu klarigo, kiun mi tuj donos:

Ni ne antaŭvidas, ke ni faros pli multe kaj pli bone ol la aliaj sur la terenoj, kiujn ili elektis. Ni estas pretaj utiligi la rezultojn de iliaj eksperimentoj, kaj omaĝi ilin pro ilia laboro. Tamen ni volas fari originalan kontribuon. Elirante el tutmondista vidpunkto pri la problemo, ni ne hezitos diri, ke la disvolviĝo estas afero de la tuta homaro, afero, en kiu oni devas scii forturni la apartajn (naciajn...) egoismojn, kaj ke ĝi estas samtempe la afero de ĉiu homa grupo kaj eĉ de ĉiu unuopa homo, al kiu apartenas la respondeco pri sia sorto. Ni kredas al la modeleco kaj al la ebleco de agado de transnacia tipo kaj de mutualisma inspiro, kiu donas precipe antaŭecon al agado, kies celo estas, ke la loĝantaroj povu certigi sian nutran vivtenon dank' al sia propra produktado.

Por vera egaleco inter ĉiuj anoj de Monda Fonduso de Solidareco Kontraŭ la Malsato, ni elektis Esperanton kiel la oficialan lingvon, tamen utiligante aliajn lingvojn, ĉar nia reciproka asocio estas malferma por ĉiuj.

Dank' al la kotizoj de siaj anoj, disloĝantaj en 25 landoj, kaj inter kiuj estas pli kaj pli da esperantistoj, Monda Fonduso financis diversajn vilaĝajn projektojn:

- En Ruando: Centro de Ciama Formado por kamparanoj

- En Ĉado: Refosado de putoj, senŝlimigo de lagoj
- En Madagaskaro: Alkonduko de trinkebla akvo kaj irigacio de komuna kampo
- En Francio: Aranĝo de domo por senlaboruloj (formado kaj esploro por denove labori)
- En Senegal: Ekipo de pirogoj per motoroj, por vivteno malgraŭ la disrabado fare de riĉlandaj trolŝipoj
- ktp.

Ĉiuj profitintoj siavice partoprenas en la tutmonda solidareco per siaj kotizoj kaj la repago de malgranda prunto. Same kiel Esperanto, ĉi tiu agmaniero donas al ĉiu senton de granda egaleco.

Daniel Durand  
Membro-fondinto

Monda Fonduso de Solidareco  
Kontraŭ la Malsato  
p/a Citoyens du monde  
15 rue Victor Duruy  
F-75 015 Paris, Francio

## TEJO- gazeto pli aktuala

“TEJO-Tutmonde”, la gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, lastatempe fariĝis tre aktuala kaj alloga revuo. Ses numeroj jare kostas nur 15 nederlandajn guldenojn. La adreso de la redakcio estas: TEJO-Tutmonde, Zumhofstr. 22, CH-6010 Kriens LU, Svislando.

# Plano pri Ekologia Muzeo

Mi preparis starigon de internacia Ekologia Muzeo, kun fako pri korespondada arto en Esperanto kaj la scienco.

En konstanta ekspozicio estos montrataj naturaj objektoj difektitaj de la nuntempa teknika kaj teknologia malpurigado, kaj leteroj kaj libroj tuŝantaj problemojn pri la estonta sorto de la homa civilizacio.

Samtempe ni intencas organizi internacian instituton nomatan “Homo kaj civilizacio sur tero”.

Ni petas vin, sendu al ni viajn opiniojn, ideojn, proponojn, ekspoziciaĵojn, ktp, laŭ adreso:

Prof. d-ro Hristo Marinov,  
ul. Ami Boue 51,  
BG-1606 SOFIA, Bulgario.

## Mallonga raporto pri la leterkurso

Multaj demandas pri nia statistiko. Dum la duonjaro aŭgusto-januario aliĝis pli ol 90 novuloj, kaj hodiaŭ 545 estas enskribitaj.

Laŭ la unua cifero en la poŝta kodo, la novuloj estas geografie distribuitaj jene:

1:18	2:14	3:6
4:16	5:1	6:14
7:4	8:5	9:4

kaj en Finnlando 2 novlernantoj. Laŭ nia sperto duono laciĝas post kelkaj leteroj, sed tamen kvarono aliĝas al kluboj aŭ rekte al SEF. Ĉu la rezultato kontentigas vin? Espereble ne.

I.N.

FRU

EBBA BERGSTRAND

MOLLEVÄNGSGATAN 27 C

214 20 MALMÖ

# AVGIFTER

## Kongressavgifter Rotterdam

	Till	Från
	14/588	15/588
1. Direkt medlem i UEA	550:-	660:-
2. Icke direktmedlem i UEA	660:-	770:-
3. Kunulo/junulo/handikapulo, som själv är direktmedlem i UEA	330:-	440:-
4. Kunulo/junulo/handikapulo som inte själv är direktmedlem i UEA	440:-	550:-

## Medlemsavgifter UEA

MJ medlem med årsbok	88 kr
MA medlem med årsbok och tidningen Esperanto	220 kr
DM dumviva membro kostar	5.500 kr
men då får man tidningen Esperanto och årsboken under hela sitt liv.	

Beställ anmälningsblankett till Rotterdamkongressen hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl455, 24200 Hörby, tel. 0415/501 52. Blanketten skall sedan tillbaka till samma adress. Betalning av kongressavgifter och medlemsavgifter till UEA sker till pg 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

## Medlemsavgifter SEF

Direktansluten medlem	100 kr
Direktansluten familjemedlem (utan tidning)	50 kr
Direktansluten ungdomsmedlem	50 kr

Medlemsavgifter till SEF betalas till postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Se sid 2 för mera information.

# Parolas Estona Radio en Espe- ranto!

Estona Radio komencos elsendojn el Tallinn en Esperanto. La elsendoj en la Internacia Lingvo okazos ĉiun unuan kaj trian semajnon de la monato, jaŭde je la horo 22.30 laŭ la Universala Tempo (Grenviĉa Meza Tempo), kaj estos ripetataj dimanĉe de la sama semajno je la 10.15, kun 15-minuta daŭro. Ondolongoj 290 m (1034 kHz) kaj 49,3 m (6085 kHz).

La temaro de la elsendoj: Novajoj de la soveta kaj estona Esperantomovadoj, agado de Esperantokluboj, instruado kaj lernado, intervjuoj, respondoj al demandoj de la aŭskultantoj, ktp. La elsendoj estas eksperimentaj: Okaze de sufiĉa intereso ili povos esti plilongigitaj kaj plioftigitaj.

Reejoj, demandoj kaj proponoj, sed ankaŭ informoj pri la aŭdebleco, estas atendataj laŭ la adreso:

Esperanto, Estona Radio,  
Tallinn,  
SU-200100 Sovetunio

## Unikt tillfälle!

"La radio del Papa"  
- om Vatikanradion.  
Diabildserie på 60 bilder  
med kassett på esperanto  
säljes till högstbjudande  
(lägst 250:-).

Georg Johansson,  
tel 031 - 15 57 25 eller  
031 - 15 57 23  
(telefonsvarare).